

LIA AMO VENU AL VI

„Firme kuraĝu kaj esperu al Sinjoro“ – tio estis motode Renkontiĝo de Junaj Familioj en Pöllau en la jaro 2014. Tiujn vortojn el psalmo 27 analizis en la renkontiĝo Sac. Luc Emmerich CSJ. En revuo VISION 2000 estis publikigita jena eltraĵo el lia prelego, elsendita per Radio Maria de Aŭstrio.

Por ke ni povu esperi al la Sinjoro, ni devas ekkoni lian amon. Ĉe tio gravas rememoriĝi pri la valoro, kiun ni havas antaŭ Dio, pri la intenco, kiun Li havas kun nia vivo. Jam la fakto, ke mi ekzistas, estas signo de la Dia amo. Ĉar nia ekzisto estas neniukaze memevidenta. Tiu ununura, kiu vere ekzistas, estas Dio – de ĉiam kaj por eterne. Li bezonas neniun pluan estulon, por esti feliĉa. Li estas mem en si perfekte feliĉa.

Sed Li volas, ke ekzistu ankoraŭ iu aliuo feliĉa krom nur Li. Kial? Por ke Li sian feliĉon disdonadu. Kaj tial Li kreis kreaĵojn – ankaŭ homon, vin. Tial, ke vi estu feliĉa, kun Li, por ke inter Li kaj vi ekzistu amikeco. Kaj por vi Li ankaŭ ĉion kreis: tiun ĉi planedon, naturon – ili estas por vi! Donaco de Dio por vi. Li tion aranĝis optime. Ni ekpensu pri la akvo: Se la Tero estus pli proksima al la suno, la akvo vaporigu. Se ĝi estus pli malproksima, la akvo glaciigu. Ĝi do ekzistas ĉi tie, por vin freŝigadi.

Kaj plej granda verko de Dio estas homa animo. En vi vi havas animon, kiu estas nemortebla. Jes, ĝi estis kreita en certa momento – sed ĝi ne havos ekzistfinon, ĝi daŭros poreterne. Via korpo estas templo de via animo.

Ĉar ni estas estuloj kun la animo, certgrade ni estas kiel Li. Kaj tiel Li volis doni al ni siajn vortojn, por revelacii al ni, kion Li volas. Do Li donis al israela popolo siajn leĝojn. Sed tio ne estis ankoraŭ sufiĉa. La Dio do faris pluan paŝon kaj diris: „Mi venos kaj iĝos tia, kia estas vi.“ Dio Li iĝis homo tia, kia estas vi, ne do ekzemple kiel anĝelo. Kaj nur tio al Li ne sufiĉis. Li mortis pro vi surkruce, por ke per homo difektitata amikeco

de Dio estu kun vi renovigita. „Mi donos al vi novan vivon.“

Sed tio al Dio ankoraŭ ne sufiĉis, ĉar ni konstante ankoraŭ ne komprenis, ke Dio nin amas. Ni ne ĉeestis tion, kiam antaŭ du mil jaroj Li mortis surkruce. Pro tio „ke mia amo al vi venadu, mi iĝos por vi Pano, por ke mi ĉiutage povu venadi al vi.“

Enprofundiĝi en tiun amon de Jesuo havas fundamentan signifon. Ni neglektas tion, ofte tion forgesas. Tial estonte, kiam ni estos nervoziĝitaj, furiozaj, malĝojaj, kiam ni pensos, ke nia vivo estas fuŝita, tiam ni almenaŭ iom ekmemoru tion, kion ni ricevis.

Ni vivas ofte simple tiel laŭ ni, ni rimarkas nur niajn impresojn, emocioj difinas nian sensecon. Sed ni devas eviti tion, ke ni perdiĝu en tiuj emocioj. Nia spirito devas esti vigla. Kaj nia spirito estas vigla tiam, kiam mi konsciiĝas, kiu mi estas, kiucele mi estas ĉi tie, kio estas la vivo, de kie ĝi venas, kia estas Dia intenco. Tial rememoru pri la amo de Kristo, pri lia ĝojo, ke vi ekzistas!

Jes, estas bele rememoriĝi, ke mi estis kreita pro granda amo de Dio. Ne forgesu pri ĝojo de Dio, kiun Li havas pro vi! Ĉar nia malĝoja mondo provas tiu ĝojon en ni estingi.

Kial Dio volis, ke nasko de la infano per korpa kuniĝo de viro kaj virino estu kunigita kun sperto de ĝojo? Povus tio esti ankaŭ aliel, iel instinktece. Tiu ĝojo el kuniĝo de viro kaj la virino estas bildo de la ĝojo, kiun Dio havis ĉe via nasko. Teologio de la korpo de Johano Paŭlo la Dua tion esprimas. Do la genero de iu persono estas ĉiam ĝojo, kiel ĉiam ankaŭ devas esti. Ĉar via vivo estas ĝojo. Tion ni devus al ni konstante rememorigi. ■